

884281





I 884.281

LEO BELMONT



Sonoj Esperantaj

Tradukoj el poetoj polaj kaj alilandaj

ALDONO

Tradukoj polaj el Esperantaj

versoj de dr. Ludwik Zamenhof


Wydawnictwo M. ARCTA

w Warszawie

Kraków: S. A. Krzyżanowski.

Halerzy 80.

Cena kop. 30.



SONOJ ESPERANTAJ

AL SINJORO

Antoni Grabowski

kun sentoj de granda estimo kaj amikeco

Autoro.





P 408.389

Leo Belmont †

Wars

SONOJ ESPERANTAJ


Tradukoj el poetoj polaj kaj alilandaj

ALDONO

Tradukoj polaj el Esperantaj

versoj de dr. Ludwik Zamenhof †

Zamenhof duobla Larar



Wydawnictwo M. ARCTA w Warszawie

Kraków: S. A. Krzyżanowski

1908

Biblioteka Narodowa
Warszawa



30001018126714



I 884.281



DRUK. M. ARCTA W WARSZAWIE, ORDYNACKA 3.

1976 K 1842/4

FORKURO.

Ballado

de Adam Mickiewicz.

Li militas — jar' finiĝis;
Ne revenas — he, mortigis!..
Fraŭlineto, por juneco estu la kompat',
De principido jen veturas, jen veturas svat'!...

Princ' festenas en sia kortego;
Kaj fraŭlino ploras en ĉambrego...

Ŝiaj pupiloj, du fulmoj karaj —
Hodiaŭ nur du fontoj malklaraj!

Ŝia vizaĝo, luna pleneco —
Kiel la luno dum renoveco
Jen malaperas... Ho, la mizer'!
Domaĝ' por beleco, por sano danĝer'!

La patrino zorgas je ŝia elvido;
Por edzec-anoncoj donas la principido...

Bruege, amase veturas svataro...
— Ho ve, veturigos min ne al altaro;
Ho ve, en tombejon min nur veturigos,
En ĉerko por mi la litaĵon farigos;
Mi mortos, se pli jam ne vivas l'amato;
Kaj Vin, o patrino, mortigos kompatol

Pastro en konfesejo sidas por atendi.
— Filino! estas tempo Viajn pekojn plendi”!

Venis baptanino, la maljunulino;
Murmuretis longe la sorĉegistino:
— Forpelu pastron; for pastruleg’!
Dio kaj kredoj — songo kaj rev’...

Ĉe baptanino en mizereg’
Serĉi kompaton estas la dev’!...
Multon scias maljuna baptanino,
Multe helpi povas al fraŭlino:
Flor’filikon, caran herbon
Kaj mirindan konas verbon...
Mi ĝin havas ĉion por kompatoj,
Vi donacojn havas del’amato...
Mi alvenas helpe ĉe Vi stari,
Fortegegajn sorĉojn fari!...

Liajn harojn plektu: iĝu la serpent’!
Du ringetojn miksu: estu la konsent’!
Lasu sangon el maldekstra man’, lau tent’!...
Ni malbenos kune ĉe serpent’,
Blovos sur la ringon kun la vent’,

Vokos Lin, vokos Lin:
Do Li devas veni,
Do li devas preni
Devas preni Vin!”

La fraŭlino pekadas. La rajdant’rapidadas.
La spirit’ alvokita — la sorĉaj’ ekaŭdita...
Pordojn jam malfermigas...

Ho, knabin’, ho, knabin’! Ĉu nenio Vin timigas?

Trankvileco enĉirkaŭe statas...
Ja maldormas la knabino nur...
Sur horloĝo meza nokto batas...
Gardantaro silentas ĉe mur’.
Al knabin’ jen batis kor’ en fund’...

Sonoj hufaj tra aer' sin ŝutis..
Kvazaŭ voĉon pli ne havus hund'—
Foj ekblekis, tuj ekmutis!..

La malsupra krakas pordo,
En vestiblo longa iu paŝas...
Estantecon sian li ne kaŝas...
Malfermigas pordoju tri je ordo...
La rajdant' eniras tuta en blankaj'...
Kaj sidiĝas sur litaj'...

En raveco ambaŭ tremis...
Dolĉ'rapide temp' kuradas...
Jen la strigo ekĝemis..
Jen ĉevalo ekblekis,
La horloĝo batadas,
El ravec' ilin vekis...
— Estu sana! vivu sana!
Min reteni estus vane...
La ĉevalo mia blekas,
La ĉevalo min atendas...
La horloĝo Via vekas...
Kial ploras Vi kaj plendas?!...
Devas resti! aŭ ne restu!...
Se al Vi pli plaĉas mal'
Levu vin... sidiĝu sur ĉeval'
Kaj eternen *mia* estu!...

*

*

*

Brilas lun'; flugas nun
La rajdant' tra arbareg',
Tra kreskaĵoj, sur ŝtoneg'...
Knabinet', knabinet,
Ĉu ne kaptas Vin timet'?!
En ĉielo brilas luna lamp'...
La ĉevalo flugas tra la kamp',

Flugas kampon, kiel la venteg';
Portas illin tra la arbareg'...
En nebulo lupaj du pupiloj
Fajras kiel la lumiloj...

— En galopon, ho ĉeval', ĉeval'...
La aeron tranĉu hufa ŝtal'!..
Jen malsupren iras luno el nubeg'...
Antaŭ ol eliros luno el nubeg'
Devas ni trasalti da montajoj dek,
Dek riverojn, naŭdek da ŝtoneg'...
For antaŭen, ho ĉevalo, for!
Krios koko jam post unu hor'!..."

— Kien portas, min, amato?

Hejmen, hejmen, amatino!

— Havas domon?—Ho, havato

Ĉe mi estas, karulino,

Kiun miros Vi sen logo:

Dom' sur monto de Mendogo!...

Tage ja al ĉiu malfermita voj'...

Nokte ni veturas nur sekrete foj...

— La kastelo?... „Jes, kastelo, sed sen

[tur':

Serurita bone, kvankam sen serur'..."

— Ho, amat', ĉevalon tenu!

Preskaŭ falas mi de sel'...

Amatin', la selon prenu

Per la dekstra man', o Bel'!...

Kion havas en manet'?

Certe la saket' labora?...

— Ne, ĝi estas preĝlibret':

Altareto ora!...

— Jam ne tempo por tenado!

Aŭdu! aŭdu!... Postkurado!

Oni kuras, proksimiĝas..

Ter' sub piedoj ektremiĝas...

Antaŭ ni la profundaĵ'...

Ĵetu libron je teraĵ'...

Ĵetu libron, mia kor';
Mi ĉevalon lasos for!"

La ĉevalo, kvazaŭ pezon deĵetinta,
Estis mejlojn dudek trapasinta...

Nun tra marŝo estas la vojaĝ'...

Ĉirkaŭ ili ĉie la vastaĵ'...

Antaŭ ili la fajreto eraranta

Iras ĉiam, kiel kondukanta...

Sur la tombon de la tombo,

Flugas, kiel la kolombo.

Kie trafluginta estas,

Signo blua poste restas.

Kaj sur tiun ĉi brilaĵon

Ili faras la vojaĝon...

— Ho, amat', Vi rajdas kie?

Signojn lasis hom' nenie;

Kia vojo terurega!

— Vojo estas plej bonega!

Kiu timas kaj forkuras,

Ĉiam rekte ne veturas.

Piedaj gastoj ĉe mi ne estas,

Tial signoj iaj ne restadas.

Veturigas rondoj tien ĉi riĉulon,

Portas la servantoj do la malriĉulon!..

— En galopon, ho ĉeval, ĉeval'!

La aeron tranĉu hufa ŝtal'!

En Oriento brilas la Aŭror';

Post la horo batos la sonor';

Antaŭ ol ekbatos la sonor',

Trasaltota estas la triobla mont',

Dek ŝtonegoj kaj riveroj tri sen pont'...

Koko dua post la unu hor'!

-- Ho, amat'! retenu kondukilojn:
La ĉeval' ektimis la barilojn...
Ĉie arboj kaj ŝtonegoj sur la voj'...
Alkroĉita estis mi ne unu foj!...
— Amatin', ho ŝnuroj estas kiaj?!
Kiaj pendas tie la poŝetoj?!...
— Ho, amat'! ĝi nur koraloj miaj,
La sanktaĵoj, preĝokoronetoj!

— Malbenita ŝnur'! per ĝi estos fal'!
En okulojn ĝi brilas al ĉeval'...
Jen ektremis li ...flanken turnis sin...
Viajn amuzetajn ĵetu, amatin'!

La ĉevalo kvazaŭ multimadis...
Kvin da mejloj rekte trakuradis...
— Ho, amato! kien Vi rigardas?...
Kia estas tie la tombejo?...
— Mian korton tiu muro gardas:
Jen palaco nia, jen loĝejo!
— Sed la krucoj, tomboj post la muroj?
— Ne la krucoj, tio estas turoj.
Murojn ni trasaltos, mia amantino...
Tie ĉi eterne por vojaĝo fino!

— Ho ĉevalo, staru en la lok'!
Vi trasaltis antaŭ kri' de kok'
Tiom montojn, tiom da ŝtonegoj,
Da riveroj kaj da arbaregoj,
Ne okazis al ci la ekfal'...
Kaj nun tremas, mia ho ĉeval'!
Ha, mi scias, kial tremas ci, ho ĉevalet'...
Min kaj cin timigas jene la krucet'!

— Kial staris Vi, amato?
Akre blovas vent' matena,
Malsekigas ros' malbena,
Reteniĝas kora bato...

Mi tremadas, ho ĉielo!...
Kovru min per la mantelo!...

— Karulino, inkliniĝu,
Kun tempioj proksimiĝu;
Sur la bruston karan Vian
Metos mi la kapon mian...
Kapo brulas, fajron blovas!
Ekvarmigi ŝtonojn povas!

Ho ve, tie estas la ŝtala najleto...
— Ne!.. kruc', kiun donis al mi patrineto.
— La kruc' estas akra pli multe ol sago...
Ĝi vundas vizaĝon... Ho, per ĝia ago
La frunt' mia brulas ĉe Vi sur la kor'.
For, for tiun najlon!.. Deĵetu ĝin, for!..

La kruc' falis teren kaj tuj malaperis...
Rajdanto mirinde post tio aferis...
La fraŭlinon enmeze ekprenis,
Laŭte malbenis,
Okulojn per brilo ekplenis...
Per lia bŭso fajro ekfluis...
Ĉevalo la ridon ekbruis,
Ridon homan, en eĥo bruantan duope!..
Ili murojn persaltis galope...
Kriadas la kokoj, batas la sonoro...
Proksimiĝas matena horo...
Antaŭ ol la pastro por preĝo aperis,
Rajdant' kaj knabin' kaj ĉeval' malaperis!..

*

*

*

En tombejo estis trakvileco.
Ŝtonoj kuŝas, krucoj staras—
Plena senmoveco...
La homoj sin aras...

Rigardas: unu tomb' estas senkrucigita
Kaj sur ĝi la tero freŝe ekmovita...

Sur tombo longe staris pastro-bonfarinto,
Legis pro du animoj... meson pro mortinto!...

Traporto de Mortrestoj de Napoleon

en jaro 1840

de Julius Slovacki.

Oni ŝiris Lin cindron al tero,
Al saliko deŝiris ploranta,
Kie kuŝis kun Glora Anĝelo,
Kuŝis... ne en purpuro brilanta —
Per mantel' de soldato kovrita,
Sur la glav' kvazaŭ enkrucigita!

Diru, kian Lin trovis en tombo
Vi, reĝido, de ŝipoj estranto!?
Ĉu krucumis du manojn sur brusto,
Ĉu sur glav' havis unun Dormanto?..
Kiam ŝton' ekmovita ne premis,
Ĉu mortulo—parolu!—ektremis?!

Ĉar Li sciis, ke horo batados,
Kiu ŝtonon sur tomb' detruigos,
Sed Li pensis, ke mano de filo
Lin en tombo eklevos, movigos,
Ke la filo ĉenegojn disŝiros,
Al mortulo: „ho, patro!” ekdiros..

Oni venis el tomb' Lin ŝiradi,
Lin per fremdaj okuloj alkroĉis,
Kaj komencis la cindron mokadi
Kaj „Ho! levu sin, cindro!” — ekvoĉis..

Kaj demandis la restan putraĵon:
— En patrujon ĉu volas vojaĝon?

Bruu, bruu, jen maraj bluaĵoj,
Grandegulan do ĉerkon vi gardu!
Piramidoj, suriru montaĵojn,
Per okuloj centjaraj rigardu!
Tie mevoj — girlando surmara:
La ŝipar' kun la cindro Cezara!

Cindro, cindro! ho, kuŝu trankvila,
Kiam sonos tubar' sur marego;
Gi ne estos signal' por batalo,
Sed funebra signal' al plorego!
Lastan foj estras Vi al la roto.
Venkis ja la anim' — per Golgoto!

Sed neniam, kvankam nudan glavon,
Sceptron, mondon en manoj havadis,
Vi neniam tiel vere reĝe
Inter vicoj ĝemantaj iradis,
Kun vizaĝo tiel teruriga
Por la tempo estonta, por ĉio,
Kiel, Cindro, en horo ĉi tiu
Revenanta tien ĉi — nenio!

AL AMATINO.

de Zygmunt Krasiński.

Ho! se mi mortos, Vi diru neniam,
Ke per maldolĉo mi Vin nur manĝigis;
Ĉar mi min ankau maldolĉon trinkigis
Ĉie kaj ĉiam!

Ho, se mi mortos, Vi diru neniam,
Ke mi gajecon nur de Vi deprenis;
Ĉar propran sorton mi ankaŭ venenis,
Ĉie kaj ĉiam!

Sed, se mi mortos, Vi parolu tiam,
Ke kaŝis min en tomb' boneco Dia,
Ĉar mi nur estis malfeliĉo nia —
Ĉie kaj ĉiam!

Sed diru pri mi, sinjorino, tiam,
Ke kun sovaĝa mi vivis doloro,
Ĉar mi Vin amis maldolĉe en koro —
Ĉie kaj ĉiam!

Kiam do Reĝo iris batali...

de Marja Konopnicka.

Kiam do reĝo iris batali,
Trumpetoj oraj ludadis al li,
Ludadis al li trumpet' el oro,
Por ke li venku brava kun koro...

Kiam do Staĉjo iris batali,
Nur riveretoj bruadis al li,
Bruis en kampoj nur oraj spikoj
Pro la sospiro, pro sortaj pikoj.

Kaj en milito kugloj fajfegas,
Kaj kvazaŭ garboj homoj falegas;
Plej brave batas reĝ' kaj reĝanoj,
Plej dense falas do vilaĝanoj!...

Standardaj agloj bruas pli forte,
Krakas do ie kruc' vilaĝana.
Ho! Staĉjo estas vundita morte...
Ho! reĝ' kortegon revenas sana.

Dum li eniris pordojn el oro,
Iris kontraŭen bela Aŭroro,

Ĉiuj soniloj ludis salute,
Oni forgesis la perdojn tute...

Dum oni kavon Staĉjan fosadis,
Nur malproksime arboj bruadis,
Kaj nur mallonge sub ventoj piaj
Sonis soniloj — floroj liliaj...

Al proksimiganta ventego.

de Jaroslav Vrchlicky.

(el traduko de Konopnicka).

Tra vojon senfinan venegu, kuregu,
— Purigu la mondon!
La tondr' estas hufo al via piedo,
— Purigu la mondon!
Tremigu la teron dormete kuŝantan
En timo de morto kaj inter putraĵoj,
— Purigu la mondon!
Per ventoj sovaĝaj flugilojn rapidu,
Al blov' kondukilojn aerajn eklasu,
— Purigu la mondon!
Kaj ĉion malnoblan, malaltan, batadu,
Kaj pro nevenĝito ekvenĝu kruise,
— Purigu la mondon!
Ho batu!... En koro en mia ekbrulu,
Por ke renaskiĝu mi, kiel fenikso...
— Purigu la mondon!...

M I L I T O .

de Ludvika Ackerman.

(el traduko de M. Konopnicka)

Fajron!... Sangon kaj feron!... ĝi!... ho, batalo!
Staras granda, kolera... Man' dekstra el ŝtalo

Levita batalantojn al glavoj kurigas,
Ĝia voĉo la sangon en vejnoj bruligas;
Jen kapon ĝian flamaj aspidoj ekringos...
Kuglo flugas, fajfante... Atingos! atingos!...

Ĉevaloj, radoj, homoj, — mova miksa aro,
Tondras kaj bruas, kiel alfluanta maro.
Ĉe voka bru' teruro ekvekiĝas pala.
Jen falas kraziaŭ fulmo la maldekstro ŝtala;
Je ordon' malaperas al tranĉoj barilo;
Ĉia vir — jen soldato, ĉio — batalilo!

Kaj kiam saturiĝos jam ĝiaj okuloj
Per turmento, detruo, malbelaj mortuloj,
Kaj popol' agonias sub piedo ŝtala,
Ĝi ridetas fiera — sub la laŭroj pala.
Ĉe labor' sia kriojn de triumfo ŝutas...
Morton lacigan vorte: „Bonrikolt'!” salutas...

Ho jes! jes! bonrikolto!... Rikolt' sufiĉega!
Kuŝas spikoj malvivaj — densaj' terurega!
Da belaj, junaj, bravaj milojn mort' ekprenis,
Kaj kvazaŭ kamp', je kiu falĉiloj travenis,
Senordajn palajn spikojn portas la homaro
Sur brusto sangigita, kun trem' kaj larmaro.

Ho, dolor'! Ja hieraŭ ĉe printempa blovo
Florantaj tiuj spikoj sin en dolĉa movo
Balancis sur trunketoj junaj kun espero,
Ke sub sun' maturiĝos en ili grajnero,
Ke riĉan frukton portos al patruja mano,
Ke ne pajl' piedita estos... sed la pano!



Reveno de l'kanto.

de Asnyk.

Kanto, kiun karulino
Ofte ho! al mi kantetis,
Kanto longe forgesita
Mian dormon malhelpetis...

En antikva melodio,
Tiel longe forgesita,
Sonis rido de infano,
Fluis larmo enkaŝita...

Kial ĝi nun re eksonis
En la kor', mi ne komprenas,
Sed la belajn vortojn, sonojn,
Aŭdas mi kaj kore benas...

Se la kantoj, kvazaŭ birdoj,
For ekflugas ĉe autuno
Kaj revenas verdajn kampojn
Kun printempa varma suno,

Jen reveno de ĉi kanto
Kiu tiel ame spiras,
Novan vivon kaj printempon
Eble al mi antaŭdiras!

Sed se kantoj ho! nur estas
Kvazaŭ homa ombr' sen pezo,
Kiu granda en mateno,
Malkreskanta ĝis tagmezo,

Pligrandiĝas nun denove,
Kiam sun' malsupren iras, —
Vel reven' de l'kanto eble
Nokton por mi antaŭdiras!...

Se mi pli juna estus...

de Adam Asnyk.

Se mi pli juna estus, fraŭlino,
Ho, se mi estus pli juna,
Mia trinkaĵo estus ne vino,
Sed el rigardoj Viaj la suna
Nektaro dolĉa, fraŭlino!

Vi min tiame ekamus eble,
Anĝelo klara...
La kor' ekstremis nun nehalteble,
Feliĉ' ja estus troe senbara,
Se Vi min ekamus eble...

Ne serĉus mi tiam sur nokta ĉielo
Je lun' aŭ stelaro...
Mi Vin rigardadus nur, bela anĝelo,
Ĉar Vi ja pli multe eklumas, ol klaro
De stala ĉielo...

Mi malestimus sunan klarecon
Kaj dolĉan printempan spiron...
Mi trinkas sole Vian belecon,
En Vi havante mian inspiron
Kaj sunklarecon...

Sed ve! mi estas troe maljuna,
Ve! mi ne povas jam peti,
Ke min varmigu la amo suna...
Mi sole povas kanton kanteti,
Estante troe maljuna...

De Vi forkuras mi kun sufero,
Ho Vi, papilio ora!
Ĉar ne permesas al mi fiero,

Ke mi montriĝu sopira, plora...
Forkuras mi kun sufero...

Mi ride trinkas... Mi trinkas vinon
Kun miaj larmoj miksitan,
Kaj mi rigardas, bela knabino,
Vian estonton, nube kovritan,
Kaj trinkas vinon...

Dum miaj jaroj junaj...

de Asnyk.

Dum miaj jaroj junaj
La tagoj estis pli sunaj,
Pli bela estis somer'...
Nun mondo iĝis alia,
Malĝoja ombro ia
Nun kuŝas super la ter'.

En miaj junaj jaroj
Belaj odoroj kaj klaroj
Fluadis el flor' del' am'...
Hodiaŭ vane la koro
Serĉas je tiu floro...
Nubego ĝin kovris jam.

PROGRESO.

de Asnyk.

Laboroj vanaj! vana plend'!
Senforta malbenado!
La formojn mortajn ia sorĉ'
Ne turnos al estado!

Per temp' preniton al la temp'
Ne povas mond' depreni!

Ne povos fajr', ne povos glav'
Kurantan penson teni...

Kun vivaj ĉiam iru vil!
La novan vivon amu!
Obstine per velkinta laur'
La kapon ne ornamu!

Ne repuŝebla viva ond'!
Sencele vi sopiros!
Koler' senforta! vana plend'!
Antaŭen mondo iros!

P I N O .

El Tetmajer.

La sola pino bruas
Sur kruta la ŝtoneg'...

Ĉe la piedoj ĝiaj
Nigrigas profundeg'...

Ĉirkaŭas ĝin malvarma,
Malgaja mur' granita...
Kaj supre nigrajn nubojn
Kurigas vent' subita...

Per la dezerto ŝtona
De ĉie ĉirkauita,
La sola pino bruas
Senfine ĉagrenita...

HIMNO AL AMO.

de Kazimierz Tetmajer.

Vi estas fort' plej alta, al Vi obeas ĉio,
Amo!

La vivo estas volo: Vi estas vol' plej granda,
Krom sama vol' de vivo. L'animo de l'animo,
La kor' de l'kor' de vivo — ĝi estas Vi,
Ho amo!

Se la feliĉ' plej alta forgeso estas vere,
Senscio, senmemor' pri si, pri esto sia—
Vi estas do feliĉo de feliĉ';

Ĉar metas Vi al pens' malsobran finon, —
Amo!

Se la fantomoj estas sola bono:
Vi estas do plej alta bono,

Ĉar Vi plej forta estas el fantomoj,
Vi, forto de la forto,
Sovaĝa, baron nekonanta,
Unuenaskita, sankta la forteg'
De l'amo!

Se la deziroj estas apogo tiu sola,
Kiu defendas nin, ke ni ne falu
En profundaĵon de malesper' kaj abomen',
Se estas ili sola pont',
Sur kiu ebla estas voj'

Super la profundejon de l'enuo;
Se estas ili sola kuracil'

Kontraŭ doloroj du: senkredo kaj malplaĉ',
Kaj malestimoj du: al mondo kaj al si;
Jen estas Vi, patrino de deziroj, —
Apogo nia, ponto nia, nia kuracil',
Vi estas savo al homar'
Ho, amo!

Tempo iras, religioj sin ŝanĝas,
Dioj falas en polvon, ĉi tiuj post tiuj,
Honorataj hodiaŭ, morgaŭ piedbatitaj,
Trairas ĉe okuloj de homaro,
Por ke reiru neniam!

Vi do daŭras eterna, kiel timo, malsato, envio,
Unuenaskita, kiel ili,
Triumfanta, kiel ili,

Super ĉion starigita,
Neniam kaj nenie venkota, kiel ili,
Ho, Vi, unuenaskita sovaĝa fortego
De l'amo!...

Sorĉo kaj beleco de l'natur',
Kie estas Vi ĉe sorĉo kaj belec' de l'amo?
Vi estas kiel kadro al pentraj'
Kiel arko de briloj
Al bruliga suna disko.
Ho kie estas vi, folio de rozo,
Ĉe buŝeto de la amatin'?
Kie estas vi, ĉiela safiro kaj mara bluaĵo,
Ĉe okuloj de la amatin'?
Kie vi, trankvilo de grottoj en mez' de flikoj
Sub densaj plaktaĵoj el heder'
Ĉe mallauto de la amatin'?
Kie Vi, ho neĝo, roze - pala
Pro bril' de suno,
Ĉe koloro korpa de la amatin'?...
Kie vi, linioj mirindaj de montrokoj,
Kie ĉielarko brilanta,
Kie bantoj de falakvoj fieraj,
Narcisoj graciaj kaj palmoj altkreskaj,
Kie nuboj facilflugaj, moviĝemaj,
Ĉe formo de korpo de la amatin'?
Kie vi, musko mola, folio velura,
Ĉe altuŝo de ŝia bust' aŭ man'?
Kie Vi, marmuro glata, de sun' varmigata,
Ĉe blankaj femuroj ŝiaj,
Fluiĝantaj per limo mirinda
En la formon,
Kiu spiron haltigas, okulojn trinkigas,
Kiu manojn alforĝas al ŝi?
Kie vi, song' de nokto luna,
Songo de mateno, kiam suno suriras

De malproksimaj montoj;
Kie vi, beleco de lagoj dormaj,
Aperantaj subite inter ŝtonegoj,
Kaj vi, beleco de verdaĵo ora,
Vidata el supraĵoj malproksimaj,
Ĉe beleco de la amatin'...

Kie estas vi, melankolio de aŭtunaj vesperoj,

Ĉe ŝia ĉagren'?

Kie gajo de somera meztago

Ĉe ŝia gajec'?

Kie songoj pri gloro, pri potenco,

Pri fiero venkanta, pri repago de ofend',

Pri rebato al maljust',

Ĉe songoj pri la amatin'?

Kie deziro de or'havado

Ĉe deziderado de plenkono de animo

De la amata virin'?...
Jes! Vi estas plej alta el fortoj, vivo de vivo,

Ho, amo!

Plej dolĉan kareson kaj plej kruelan doloron

Vi igas; Vi estas, kiel morto, la reĝin'

De ĉiuj estaĵoj de l'tero,

Vi, unuenaskita fortego

De l'amo!...

LA FLORO.

de Ĉeslav Jankovski.

La flor' en arbaro elkreskas.. La nokto

Sur ĝi ĉiam l'ombrojn alpelas...

La perlon de roso, la solan trezoron,

Ĝi sur folietoj ŝancelas.

Matene la brilo de suno enfalis..
La perlon de roso ĝi ŝtelas..
Kaj floro malriĉa en l'ombro trankvila
La siajn foliojn ŝancelas..

* *
*

de Ĉeslav Jankovski.

Kiomfoje mi ŝin demandadis,
Ĉu mi loĝas en sia koreto,
Ĉiam: „jes!” okuloj paroladis,
Ĉiam: „ne!” diradis la buŝeto!

PORTRETO.

de Ĉeslav Jankovski.

La amaso strata ĝojas
Ĉe fenestro de elmeto.
De la mia sinjorino
Tie staras la portreto.

Oni puŝas sin en strato..
Kaj disputas kritikisto
Pri beleco sinjorina,
Pri talento de artisto.

La maljuna konsilisto
Laŭdas „belan ĉi personon”..
Taksas laŭte sciemulo
En pentraĵo „sukan tonon”.

„Ĉu pentritan Vi ne konas?”
Iu trude al mi diras..

La amaso en la strato
Ĝis vespero ne disiras

Mi rigardas mem kaj miras
La majstrecon, ho! sen fino...
Jes, jes, jes! okuloj Viaj
Tiel brilas, sinjorino!

Ĉio kiel en naturo,
Ĉia vivas nuanceto!
Eĉ postsignon de la koro
Vi ne trovos en portreto!

EN BALO.

de Ĉeslav Jaukovski.

„La mondo estas la grandega konko
Kaj Vi en konko estas perlo sola...
Kaj gloras perlon tiun rozodoroj
Kaj najtingala kanto bonevola...

La suno, ĉiujn mondojn viviganta,
Estas nur unu malgranda fajrero,
Kiu ek flamoj de la koro mia
Ekflugis ien supren tra aero!..”

Tiel en Ŝiras pri Vi, Sinjorino,
Kantus antaŭe, komprenante ami,
La Muhammedo Ŝems-ed-dino Hafis,
Aŭ Ĝelal Pumi, aŭ granda Nizami.

Sed mi ne povas sekvi tiajn kantojn,
Ĉar ni en Ŝiras ĥodiaŭ ne venas
Kaj, due, niaj belaj sinjorinoj
La lingvon persan tute ne komprenas.

Kaj, sinjorino, mem cetere pensu,
Kiel de persaj madrigaloj laŭto
Prezentus mire en nia epoko,
Ĉe mia frako, en ĉi tiu raŭto!

SOLVITA MALPACO.

de Kazimieĵ Glinŝki.

Okazis unufoje, ke pork' kaj simio
Terure disputadis pro io!
Flugas vorto post vorto malpaca, malbela:
„Vi estas ja tiela!”... „Kaj Vi ĉi tiela!”...

Kolere fajraj ili jam ne povas koni,
Kian nomon al la dua doni!
Fine la afero estas klarigita,
Ofendigo trafa ek trovita:
Unutempa sonas krio:
„Vi—la porko!” ... „Vi—simio!”...

PAŬLO KAJ GAŬLO.

Vivis Paŭlo kaj Gaŭlo en dom' tiu sama:
Paŭlo — supre kaj Gaŭlo malsupre loĝadis...
Paŭl' neniu ofendis trankvila, pacama;
Plej sovaĝajn petolojn do Gaŭl' elpensadis.
En la ĉambro li ĉasis: jen hund', jen leporo;
Inter tabloj, tabletoj, li pelas kaj sonas
Kaj trumpetas kaj pafas; en ĉasa laboro,
Kriegante, saltante, laciĝon ne konas.
Paŭlo ĉion toleras; sed fine ne povas...
Iras suben al Gaŭlo, petegi lin provas:
„Kompatiĝu, sinjoro, kaj ĉasu pli mole,
Ĉar ĉe mi ĉiuj vitroj ekfalas senvole.”
Kaj Gaŭlo je ĉi tio: „Libera hometo
En sia dometo.”

Kion je ĝi respondi?! Paŭl' ĉapelon prenis,
Eĉ vorton li ne pepis kaj hejmen revenis.
Morgaŭ Gaŭlo ankoraŭ bonguste ronkadas,
Jen nazon lian io de plafon' gutadas...
Li eksaltis el lito kaj supren rapidas.
Frap! frap! — fermito!... Kio?!.. Per tru' li ekvidas
Strangaĵon: tuta ĉambro estas akvoloko,
Kaj Paŭlo sur komodo sidas kun fiŝhoko.
„Sinjor', vi kion faras?!“ — „Mi kaptas fiŝetojn!“
— „Sed, sinjor' mi sur kapo sentas la gutetojn!“
Kaj je tio ĉi Paŭlo: „Libera hometo
En sia dometo!“

El fabl' morinstruon Vi legos facile:
„Vi — tiel al alia, li al Vi simile!“

Skribis

Fredro.

POLAJ KANTOJ POPOLAJ.

1.

Levu kuraĝe nian standardon,
Kvankam ventego kontraŭa bruas,
Kvankam perforto tenadas gardon,
Kvankam nin vivo ŝarĝa detruas, —
Ĉar ĝi — standardo por tut'homaro,
Labor' triumfo, kant' de justeco,
Por la popoloj frata altaro,
Santa Aŭror' de reviviĝeco!

Falas malsata aro labora,
Teruran vivas ni periodon:
Junulo estus do malhonora,
Se timus iri sur eŝafoden!
Vane mortigo l'ideon neos,
Ĉia sangero estas venkonto...

Brulu sankt'fajro!.. Multaj pereos,
Sed nia estos bela estonto!

Iru antaŭen sangan batalon,
Pro idealo —
Marŝ, marŝ, rapide!..

2.

El nia sango fluas lago,
Maron de larmoj ploris ni..
Sed venos tago de repago,
Juĝistoj tiam estos ni',
Juĝistoj tiam estos ni'.
Antaŭen, antaŭen, kantu ni,
Standardo flugas super tronojn,
Ĝi estas tondr'koler', venĝa kri',
Sign' de amas'harmoni'
Sed ruĝan havas ĝi koloron,
Ĉar sur ĝi — laborista sang'!
Ĉar sur ĝi — laborista sang'!..

.

EL „EKKLEZIASTES“.

el versa transkripcio

de Ĵulavski.

Mi flo Davida, preĝej' — oratoro,
Mi reĝ' Izraela, saĝul' de Sinjoro,
Mi veron serĉadis kaj multon ekkonis
Kaj libron sekvantan al mondo mi donis: —

La Vano de Vanoj kaj ĉio — Vaneco!
Al hom' el laboro pro rest' — Nenieco!
La farojn de manoj vermaro mordetos,
Al ĉio Neniø la fino almetos!

La nomo naskiĝas kaj vivas kaj mortas...
Kaj novajn vivulojn la tempo alportas
Por nova laboro, doloro, sufero...
Ĉi tiuj pereas — nur staras la tero.

Kaj super la tero sun' klara sin levas,
Kaj brilas kaj iras ĝis la okcidento...
Kaj jen estingiĝas... Kaj iri re devas
Laŭ sama la vojo, laŭ sama la tento...

Kaj ĉiuj riveroj iradas al maro
Kaj maro neniam de bordo elvenas...
Eterne sin turnas returna akvaro,
En samaj la litoj eterne sin tenas...

Kaj vento de nordo al sud' iri penas
Kaj re turnas norden flugilojn en rondo;
Kaj ĉio travenas, kaj ĉio revenas,
Neniu ja nomos la ŝanĝojn de l'mondo.

Okulo rigardas pentraĵojn konstante,
Sed estas de vido satiga neniam...
Orelo neniam pleniĝas, aŭdante,
Kaj sonoj de l'mondo traflugas ĝin ĉiam.

Kaj tamen reiras nur kio jam estis,
Kaj kio fariĝis, fariĝos ja same...
Kaj ĉio malnove lub suno ja restis
Kaj homa laboro movigas sin lame...

Ho, kiu kuraĝas la propran kreaĵon
Nomigi „la nova”? Antikva maljuno
Jam konis iame la nian novaĵon...
Nenion do novan vi havas sub suno.

Memor' estingiĝis nur pri malnovaĵo
Kaj nur eksilentis la vortoj estintaj,

Sed kiu memoros pri nia faraĵo,
En tempo, en kiu ni estos mortintaj.

Mi sekve saĝulo, preĝejatoro,
La estr' Izraela kaj Jeruzalema —
Ĝin ĉion vidanta kun larmoj en koro
Vivadis tra jaroĵ maldolĉe pensema.

Kaj mi do decidis ĉi tion esplori,
Pri ĉio atente kaj saĝe konadi,
Kaj ĉion ĝis grajno de vero trabori,
Kaj kion mi trovos, en librojn lokadi...

Ĉar lasis al filo de tero Dieco,
Ke lin plej malbona amuzu ludilo,
Ke tempon li perdu en serĉ' je saĝeco
Por koni, ke ĉio — nur polv' kaj argilo!

Ho! vano de vanoj kaj ĉio vaneco
Kaj ĉio nur vana turment' de animo!
Nur homon malsaĝan ne tenas saĝeco,
Malbona ne povas elrampi el ŝlimo...

Mi pensis: jen granda mi estas sur tero
Kaj en Izraelo per saĝ' estas glora...
Ne vivis antaŭe pli granda scivero;
Pli granda ne kreos estonto labora...

Ekkonis mi ĉiujn objektojn sub suno,
Malsaĝon kaj saĝon, malvirton, noblecon...
Kaj vidis, ke ĉie van' estas en nuno,
Kaj havos en fino — doloron, vanecon...

Jen vokas al vi mia voĉ' eterneca:
Ke vant' de prudento vin nur suferigas.
Maldolĉ' estas fundo de vazo saĝeca!
Multigas vi scion — doloron multigas!

PETOLA LUNO...

de Leo Belmont.

Petola luno la oran zonon
Ĵetis sur maron — kaj jen
Ĉieta ondo kuras volonte
Kaj ŝaŭmas: „Ho, mia ĉen’.”

Ĉar nimfo vivas en ĉia ondo
Kun koketeca bezon’
Kaj ĉia nimfo la brilon amas;
Al ĉia plaĉas la zon’.

Unu do duan en ordo premas,
Kaptas ornamon de ĝi,
Perdas... Ĝemante, kreas en bordo...
El ondoj sonas la kri’!...

HORO DE MORTO.

de Leo Belmont.

Kvankam morto malvarma kutimas eltiri
Siajn manojn kruele,
Lasi mondon ĉi tiun, mallumon eniri —
Ne timigas tiele!

Devas veni ja fino al ĉio vivanta,
Al batado de koroj...
Enuigas nin fine la ŝanĝo konstanta
De la ridoj kaj ploroj.

Sed forlasi karulojn en horo de morto
Al kruela la sorto
Kaj en tombon subiri, aŭdante la ploron, —
Nur ĝi faras doloron!

V E S P E R O .

de Leo Belmont.

La vesper' trankvile venas
Brilas klare la Vener'...
Nokt'angelo teron benas,
Benas ĉion sur la ter'...

De florspiro sin enplenas
Per dolĉeco la aer'...
La vesper' trankvile venas,
Brilas klare la Vener'...

Najtingaloj gardon tenas
Kantas ame dum vesper'...
Noktanĝelo teron benas,
Benas ĉion sur la ter'...

Kial nur en mi sin tenas,
La venteg' kaj malveter'?...
De florspiro sin enplenas
Per dolĉeco la aer'...

Kial koro sin enplenas
Per sopiro kaj sufer'?...
Najtingaloj gardon tenas
Kantas ame dum vesper'...

La animon ĉirkauĉenas
La dolor' kaj la koler'...
De memoro ne elvenas
La ofend' kaj la malver'...

Mi forgesi vane penas,
Kiel falas la liber'...
Kiel hom' al homo prenas
La liberon per la fer'...

Cie forto gardon tenas
Kaj triumfas memafer'...
La esper' de mi devenas
Kaj estingas eĉ fajrer'...

Tiu ĉi profiton prenas
Sen laboro, sen ofer'...
Tiu tage, nokte, penas
Por grajnero, por akver'...

La mallumo min enplenas
Dum ĉi tiu belvesper'...
La vesper' trankvile venas
Brilas klare la Vener'...

Mia sorto min malbenas
Por sendormo, por mizer'!..

.
Noktangeloj teron venas,
Benas ĉion sur la ter'...

KRIO DE MALESPERO.

de Leo Belmont.

La homo militas, la homo batalas;
Dauriĝas kruela la bato!
Kaj homo post homo en sango ekfalas,
Trafita per mano de frato!

Daŭregan, frenezan, sovaĝan la baton
Nenio do povas retenigi,
Dum homo en homo ne sentas la fraton,
Ne povas alian kompreni!

En ĉambro trankvila saĝulo songema
Alvokas la amon la sunan,
Tagnokte dum jaroj laboras pacema,
Kreadas la lingvon komunan!

Kreaĵon mirindan, genian, moralan,
Donacas al mond', al homaro...
Kaj vokas en himno amason batalan,
Ke iru al ama altaro.

Sed vane en bruo alvoko ekfalas —
Perdiĝas la voĉ' de kompatato!
La homo militas, la homo batalas,
Dauriĝas kruela la bato!

Ho! kiam eksonos el koroj, el fondo,
Komuna, frateca belkanto,
Kaj stelo de paco eklumos al mondo
Kaj venkos spirit' — *Esperanto*?!

MORTULO.

de Leo Belmont.

Kial krias korvo avidulo
Kial longe superflugas min?
Ĉu tie ĉi proksima mortulo
Per odoro tiel vokas lin?...

Ha! mi legas en signifo kria,
Vidas kaŭzon en avida trem':
Post la amo malfeliĉa mia
Estas preskaŭ mortulo mi mem!...

VORTLUDO.

de Belmont.

Diras la instruistoj: en granda la Homero
Estis multo da homoj. Ĝi eble estas vero,
Sed al esperantisto pli grandaj estas veroj:
En ĉiu homo estas multego da hom'eroj!

JUNULARO.

El «Rimoj kaj Ritmoj»
de L. Belmont
tradukis
Aŭtoro.

Tre ŝanĝema plato mara
Estas mia la humor'...
Jen mi brilas gaje-klara,
Jen nubigas min dolor'...

Foje estas mi fontano,
Foje estas mi kaskad'...
Paradiza nun regnano,
Nun anĝelo en falad'...

.
De centjaro malfeliĉa
Malfeliĉa infanar',
Nur de steloj ekfalantaj
Brilas al Vi radiar'...

Viaj pensoj, viaj sentoj
En movado sen haltil'
Ripozejon havas eble
Sur flugil' de muelil'!

Kiam suno ekaperas
Kaj ekkreskas bela flor',
Vi, ferminte la okulojn,
De la suŝo kuras for!...

En la mondon de misteroj
Kaj de mire kurba sent'
Vi rapidas, malsanuloj,
Kvazaŭ sablo kun la vent'...

Kaj fraŭlino belvizaga
Kun la sia ĉarma pur' —
Por vi, junaj maljunuloj,
La enigmo estas nur.

Aŭ ludilo interesa,
Taŭga por la detruad',
Aŭ animo por veneno
De malvero kaj trosat'.

Vin bruligis frua fajro
Kaj la cindro restis nur...
Vi, velkintaj, jam ne povas
Senti forte sen mezur'...

El ĉielo de okuloj,
El rubenoj de buŝet',
Vi ne trinkas jam feliĉon
Sen trosato kaj sen ted'...

Kaj ĉielen fronton klaran
Vi ne levas supren jam;
Viaj buŝoj ne soniĝos
Per la kant' de ĝoj' kaj am'?...

Enuiga estas por vi
Fablo senta, kampa vid'...
Ne lumigas trajtojn viajn
La honesta kora rid'...

Vi ne scias, kio estas
En rilatoj homaj san',
Kaj ne povas premi frate
Fremdan manon per la man'...

De centjaro malfeliĉa
Malfeliĉa infanar' —
Fremda estas al naturo,
Fremda estas al homar'...

En serĉema pens' ilia
Vana estas la preciz':
Ne ektrovos veran grajnon
La tro saĝa analiz'...

Nur rompiĝas en la manoj
Vaz' kristala de feliĉ;
De la tuta riĉ' de vivo
Restas vano kaj malriĉ'...

Ne serĉinte la trankvilon
En la sia propra kor',
Oni serĉas en la tombo
Malmemoron por dolor'...

.
Nokt' aŭtuna... En ĝardeno
Velka falis nun foli'...
Ho! folio flave—velka,
Mi ja estas frat' al vi...

NOKT' EN LA KORO.

el Byron.

Nokt' en la koro.. la harpo kuŝas...
Vi tuj ekkantu, kantisto!
Se Vi la kordojn de l'harpo tuŝas,
Vi miron faras, artisto!

Se kor' ankoraŭ havas esperon,
Per kanto ĝi revekiĝos;
Se la okulo kaŝis larmeron,
Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' Via tondru mondan doloron!
La gajon mi ne komprenos...
Vi min plerigu, movu la koron,
Aŭ mia Brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝiĝis,
Silentan premis la ĉeno!...
La tempo venis.. ĝi jam pleniĝis,
Kiel vazet' da veneno!...

JAM DORMAS MONTPINTOJ...

el Goethe.

Jam dormas montpintoj
En nokta mallum'...
Kaj valojn trankvilajn
Plenigas nebul'...
Ne polvas jam vojo,
Ne tremas foli'...
Atendu nemulte:
Ripozos kaj cil'...

P R E Ĝ O.

El Lermontov.

Se premas min doloro
En malfacila hor',
La preĝon mi en koro
Diretas el memor'...

La forto estas ia
En vorta kunsonec'
Kaj spiras en ĝi tia
Sankteco kaj dolĉec'...

Senkred' jam ne doloras
D' anim' ekfalas for...
Kaj oni kredas, ploras,
Kaj faciligas kor'...

E P I G R A M O.

de Minajev.

Similas Vi al Robespiero:
Vi estas prava, kara frato!
Vi estas ankaŭ oratoro,
Vi estas ankaŭ advokato.

Pro paroladoj politikaj
Al Vi egala estas gloro...
Kaj tian grandan similecon
Konfesas mi el tuta koro...
Malgranda unu diferenco
Tamen per dubo koron frapis:
Lin — senkapigis gilotino
Kaj Vin... la sorto mem senkapis!

MALJUNECO.

de Nekrasov.

Ripozon jam petas la korpo malsana,
Turmentas l'animon mistera soif'...
Labor' maljunula! vi estas do vana!
Mokante, malvarme parolas la viv':

Deĵetu esperojn, pacigu la koron,
Komprenu, ke estas Vi tute sen fort',
Trankvile rigardu senfinan doloron,
Trankvile atendu, ke venu la mort'!...

EL INTERMEZZO.

Heine.

trad. Leo Belmont.

1.

En plej bela monato, en Maj',
Kiam ĉia ekfloras la flor',
Ho, ekfloris ja ankaŭ la am',
Ĝi ekfloris en mi, en la kor'...

En plej bela monato, en Maj',
Kiam sonas birdara sonor',
Eksonoris por ŝi mia kant'
De deziro, de kora dolor'!...

2.

El miaj larmoj ekkreskas
Amasa ĉarma flor'...
Kaj el sopiroj ekflugas
Najtingalara hor'...

Se Vi min amos, fraulino,
Por Vi estos mia florar'
Kaj sonos ĉe Via fenestro
Matene najtingalar'...

3.

Mi volus meti la animon
Kalikon de lilia flor'...
La kanton pri la amatino
Lilio sone spiru for'...

La kanto devas tremi, bruli,
Kiele kiso el la kor',
Kiun ŝi donis al mi iam
En la mirege dolĉa hor'...

4.

Senmove staras en altaĵo
La steloj, brilas ja per oro...
Miljarojn staras, reciproke
Rigardas sin kun amdoloro...

Parolas ili ian lingvon,
Belegan, riĉan, lumlinian...
Nenia tamen filologo
Ĝis nun komprenis lingvon tian...

Mi tamen ĝin eklernis bone,
Neniam mi forgesos ĝin...
Servadis ja pro gramatiko
Por mi vizag' de l'amatin'!...

5.

Vi estas, kiel la flor',
Tiel bela kaj pura kaj ĉarma...
Mi rigardas Vin, — kaj la kor'
Konsumiĝas per tremo malvarma...

Kaj ĉielen etendus mi for
Miajn manojn kaj petus mi larma,
Ke Di' lasu Vin por sia glor'
Tiel bela kaj pura kaj ĉarma...

6.

Mi portos Vin al Gangeso
Sur la flugiloj de kant'...
Plej kara! lokon mirindan
Mi konas en tiu land'...

Tie en paca lumbrilo
Ekfloras roza ĝarden'...
La lotosfloroj atendas
Je Via fratina alven'...

Violoj rigardas stelojn
Kun karesanta ridet'...
Odorajn fablojn rakontas
Rozoj al si en sekret'...

Gazeloj piaj kaj saĝaj
Kuras en blua aer'...
Kaj bruas en malproksimo
Ondoj de sankta river'...

Tie ni volas nin meti
Sub palmo en dolĉa sven'
Kaj trinki amon kaj pacon
Kaj songi pri ĉarm' kaj ben'...

7.

Karulin', Vi devas diri,
Cu ne songo estas Vi,
En somera tag' florinta
El poeta fantazi'?...

Nel erar'!... Buŝeton tian,
Sorĉon de la okulet',
Tiel dolĉan knabinton
Ne ekkreas la poet'!...

Nur vampirojn, baziliskojn,
Monstrojn, idojn de malam',
Nur terurajn fablajn bestojn —
Poetara kreas flam'!...

Vin do... kaj ruzecon Vian
Ĉe anĝela vizaĝet'
La rigardojn piajn... falsajn...
Ne eksongos la poet'!...

8.

Kial paliĝis tiele rozoj?...
Parolu, ho karulin'!..
Kial en verda herbo violoj
Silentis kaj kaŝis sin?!...

Kial fariĝis tiele plenda
La kanto de najtingal'?
Kial sin levas odor' mortula
De ĉiuj floroj en val'?...

Kial rigardas suno sur montojn
Malvarme kaj kun koler'?
Kial similas al muta tombo,
Aŭ al dezerto la ter'?...

Kial mi mem malsana, malĝoja,
Iras sur voj', amatin'?!...
Diru, plej kara, pleje aminda,
Kial forlasis Vi min?!...

9.

Se la floretoj povus koni,
Ke mia kor' nun estas vundo,
Ili kunplorus el profundo
Por sanon tuj al mi redoni.

Se la steletoj vidi povus,
Ke iras mondon mi sen celo,
Ili alvenus el ĉielo,
Al mi konsolon spiri provus.

Malsanon mian kaj doloron
Se najtingaloj nur ekkonus,
Plej gajan kanton ili sonus
Por revivigi mian koron.

Ĉi ĉiuj de mi staras for!
Pri mi ja scias Ŝi nur sola:
La vundon ha! al mia kor'
Ŝi faris gaja kaj petola!...

10.

Mi ploris nokte en dorm'...
Mi sonĝis, en tombo Vi kuŝas...
Vekiĝis mi kaj sur vang'
La larmo la larmon repuŝas..

Mi ploris nokte en dorm',
Mi sonĝis, ke Vi min deĵetis...
Vekiĝis mi kaj en plor'
La kapon kusenon mi metis...

Mi ploris nokte en dorm"
Mi songis, Vi estas fidela ..
Vekiĝis mi, sed la flu'
De larmoj ne ĉesas kruela...

11.

Senĉese min oni turmentis,
Kaj faris frenezan min jam...
Tiuj ĉi per amo ilia,
Kaj tiuj per sia malam'...

La panon kaj trinkon venenis
Kaj faris senfortan min jam —
Tiuj ĉi per amo ilia
Kaj tiuj per sia malam'...

S d Ŝi, kiu plej min turmentis,
Venenis, per dornoj ornamis,
Ho, ŝi min malamis neniam,
Kaj ankaŭ... neniam min amis!...

12.

Ili sin amis reciproke...
Ĝin tamen konfesi ne volis,
Rigardis sin malamike,
Brulante, nenion parolis...

Ili disiris — kaj danke
Al tempo por amo detrua
Ha! mortis de si malproksime, —
Ne sciis eĉ unu pri dua ..

13.

Junulo do amas knabinon,
Sed ŝi jam elektis alian..
Ĉi lasta alian ekamis
Kaj faras edzinon ja sian.

Knabin' de koler' edziniĝas
Je viro unua renkonta,
Veninta sur vojon okaze...
Junul' estas senesperonta...

Ho! jen historio malnova,
Sed ĉiam ĝi nova fariĝis...
Al kiu ĝi tamen okazis,
Al tiu la koro rompiĝis..

14.

En profundon de mizero
Mi faladis jam —
Min peladis sur la tero
Kalumni', malam'...

Tondro super mia domo
Ekpendigis sin,
Sed troviĝis unu homo,
Kiu savis min.

Nobla hom'! li donis ĉion.
Kion havas mi,
La malicon kaj envion
Brave rompis li!

Nur domaĝo! Vane provus
Montri sin dankem'..
Kisi lin mi ja ne povus:
Tiu hom' — mi mem!...

15.

Al brusto, al mia — ha, ĝi min doloras! —
Almetu maneton, amata knabino...
Ĉu audas, ke tie meblisto laboras?..
Li al mi la ĉerkon konstruas sen fino!

Ho! kiel li frapas interne en korol!...
La vivo forkuras, ne estas jam jam por mi...
Rapidu, rapidu je via laboro,
Ke povu mi foj je eterne ekdormi!...

A Z R A H .

de Heine.

Ĉiutage promenadis
De sultan' filin' belega,
Je l'vespero, ĉe fontano,
Kie blankaj akvoj plaŭdas...

Ĉiutage juna sklavo
Ĉe fontan' vespere staris,
Kie blankaj akvoj plaŭdas...
Ĉiutage plej paliĝis...

Unufoje principino
Ĵetis al li tri demandojn':
„Aŭdu! volas mi ekkoni
Vian nomon, teron, genton”...

Kaj al ŝi respondis sklavo:
„Nom'—Mahmed'; el tero Jemen;
„Mia gento—tiuj Azrah'
„Kiu mortas, kiam amas”...

Mi ekfermas al ŝi la okulojn...

de Heine.

Mi ekfermas al ŝi la okulojn
Kaj mi kisas jen sin en buŝeton...
Nun ne lasas ŝi min en la paco:
„Vi klarigu al mi la sekreton!”...

De vespero ĝis frua mateno
Mi reaŭdas demandan ripeton:
„Kial fermas la miajn okulojn,
Dum Vi kisas la mian buŝeton?”...

Mi ne povas mem diri, pro kio...
Mi ja havas nenian sekreton...
Mi nur fermas al ŝi la okulojn
Kaj mi kisas al ŝi la buŝeton..

GRENADISTOJ.

de Heine.

Franclandon iras du grenadistoj
El Rusa mallibereco...
Kaj dum travenis limon Germanan,
Ĝemis pro senespereco...

Sciigon tie aŭdas ĉagrenan:
Francuj' do estas perdita,
Batita granda militistaro,
Imperiestro — kaptita!

Kaj ploras kune du grenadistoj
Pro ekkonita mizero...
Parolas unu: „Malnova vundo
Brulas! ho, kia sufero!”...

Kaj dua diris: „Finita kanto!
Mi mortus de propra mano!
Sed hejme povus sen mi perej
Edzino kaj la infano!”

— „Kio edzino?! kio infano!?
Dum tiom estas perdita!...
Malsataj ili almozon petu!...
Imperiestro—kaptita!...

Se mi nun mortos, ho kara frato,
Jen peton plenumi igu:
Prenu Francujon mortulon mian,
En Franca ter' enterigu!...

Metu sur koron krucon honoran,
Ruĝan rubandon aldonu,
En mian manon pafilon metu,
Glavon ĉe flanko alzonu.

Mi volas tiel kuŝi maldorme,
Kiel en tomb' la gardanto —
Ĝis sonos iam ĉevalfrapado,
Bru' pafilega kaj kanto...

Li rajdos, rajdos, tra tombon mian...
Glavoj ekbrilos kaj fendos...
Tiam el tomb' mi arma min metos, —
Imperiestron defendos!...

GRANDA PROGESO.

Vi ne volas kredi frato,
Ke progresas ĉiam mondo...
Diras Vi, ke barbareco
Dancas nur en granda rondo.

Kun doloro Vi rakontas,
Ke vilaĝa rusa homo
La strikantajn fervojistojn
Fermis nun en stacidomo.

Kaj bruligis malfeliĉajn
Sen kompato keĵ sen vesto...
Vi demandas: ĉu progresis
Vere tia homa besto?!...

Jes, sinjor', progresis vere
En Rusuj' vilaĝanaro;
Antaŭ kelkaj nur jardekoj',
Ĝin timigis vagonaro...

La movadon senĉevalan
Por kompreni nekapabla,
Pensis homo: ĉio tio
Estas nur ludil' diabla!

Haltigadis la fervojon
Bona rusa vilaĝano
Bruligadis maŝinistojn —
La servistojn de satano!


Nun ne metas „bona“ homo
Sur la relojn barajn ŝtonojn...
Nun bruligas maŝinistojn
Por movigi la vagonojn...

Kun progreso jen naskiĝis
Amo al lokomotivo
Ne naskiĝis nur ankoraŭ
Amo al la frata vivo...

Kun progreso striko estas
Nun elpenso diablara...
Kaj pro ĝi ni povas danki
Al sistemo registara!...

L. Belmont.

Jaro 1906.



Przekłady z esperanckiego.

POEZJE

twórcy języka Esperanto

D-ra Ludwika Zamenhofs.

MOJA MYŚL.

(Mia penso).

W ustroniu wiejskiem, w wieczór letni,
Siedzące w róż alei,
Znajome dziewczę śpiewa w kółko
Piosenkę o nadziei.
O zawiedzionem życiu czyjemś
Prawi żałośnie w pieśni...
Słucham... a w sercu stara rana
Krwawi się wciąż boleśniej...

„Ho, ho, mój panie! czyś pan zasnął?
„Siedzi pan tak bezwładnie...
„Czy złote widma lat dziecinnych
„Pieśń obudziła zradnie?”
Co miałem odrzec?... Nie wypada
Wyznawać cierpien szczerze,
Mówiąc z panienką, co wywczasu
Używa na spacerze.

O, moja myśli, męko moja,
Nadzieje i gorycze!
Ilem wam złożył cichych ofiar —
Ja sam już nie policzę!
Bo całą młodość, duszę całą —
We łzach, uczuciem wzniosłem —
Na władczy rozkaz obowiązku,
Na jego ołtarz niosłem...

Dziś serce ogień wewnętrzny pali,
Do życia rwie się dusza —
Lecz od wesołych ludzi zawsze
Uciekać coś mnie zmusza..
Jeśli me trudy, męki na nic,
Los każe, że zmarnieją —
Przyjdź, śmierci, zaraz... weź bez bólu...
Daj konać mi z nadzieją!...

NADZIEJA ESPERANTYSTOW.

(En la mondon venis nova sento).

Nowych uczuć trysnęłaś, krynico!
Idzie światem potężne wołanie...
Niech je wiatry na skrzydła pochwycą,
Niech roznoszą po życiowym łanie...

Głos się rozległ — wzywa ludzkie rzesze
Nie do mieczy, nie do krwawej burzy...
On nadzieję świętą w sercach krzesze,
Ludziom — wrogom wieczny pokój wróży!

Pod sztandarem tej świętej nadziei
Pokojowi się kupią szermierze...
Szybko rośnie moc drogiej idei
Dzięki pracy i niezłomnej wierze!

Trwale mury dzieliły narody,
Między niemi stały lat tysiące...
Ale padną odporne przegrody,
Gdy uderzą w nie serca gorące.

Na ośnwie jednej wspólnej mowy
Ludy myślą napelnią się Bożą,
W zrozumieniu i w zgodzie świat nowy
Jedną wielką rodzinę utworzą.

Więc szermierze wytrwają w jedności,
Wielkim trudem się swoim nie zmęczą,
Póki piękne marzenie ludzkości
Nie zabłyśnie nam wieczystą tęczą!...

H Y M N

wygłoszony przez d-ra Esperanto na kongresie esperanckim
w Boulogne sur Mer.

I.

Do ciebie, Potęgo bez kształtu, nieznaną,
Dzierżąca ten świat Tajemnicą,
Miłości i prawdy Krynico świetlana
I życia ciągłego Krynico,
Do Ciebie, przez wszystkich widziana odmiennie,
Lecz w sercach odczuta jednako płomiennie,
Do Ciebie, coś dla nas Twórczości wyrazem,
Modlimy się razem!

II.

Nie wazki szowinizm do Ciebie tu woła,
Nie ślepych dogmatów moc głucha...
Spór ludów, religij, przycichnął tu zgoła,
Tu serce płomieniem wybucha...
Z tą wiarą w moc serca, u wszystkich jednaka,
Z tą prawdy jedynej najwyższą oznaką,

My syny ludzkości zwracamy dziś twarze
Przed twoje ołtarze...

III.


Toć ludzkość powstała, jak braci gromada...
Cóż węzły w niej bratnie rozplata?
Przecż naród na naród okrutnie napada,
Brat staje się wilkiem dla brata?!
Kimkolwiek więc jesteś, Potęgo przemożna,
Niech wzruszy Cię szczerą modlitwa pobożna,
I dzieciom skłóconym tej wielkiej ludzkości
Zwróć pokój miłości!

IV.

My walki i pracy się wiążem przysięgą,
My ludzkość pragniemy zjednoczyć...
Nie dozwól nam upaść Tajemna Potęgo,
Dopomóż zawady przekroczyć...
Nasz trud pobłogosław, podeprzyj staranie,
I serca zapałom daj moc i wytrwanie,
Ażebyśmy czoło napaściom w złej chwili
Odważnie stawili!

V.

Nasz sztandar zielony poniesiem wysoko
Przed piękną i dobrą ołtarze..
I świata Tajemne dostrzeże nas Oko
I drogę nam blaskiem pokaże...
I wstrząsną się mury śród ludów wiekowe,
Od huku ich pójda odgłosy echowe...
I miłość i prawda, gdy one upadną,
Na ziemi zawładną!...



TABELO DE ENHAVO.

POLAJ POETOJ.

Paĝo.

Adam Mickiewiĉ.	
Forkuro. Ballado	5
Julius Slovacki.	
Traporto de Mortrestoj de Napoleno	12
Zygmunt Krasinski.	
Al amatino	13
Marja Konopnicka.	
Kiam do Reĝo iris batali	14
Al proksimiĝanta ventego (J. Vrchlicky)	15
Milito (Ludvika Ackerman)	15
Adam Asnyk.	
Reveno de l' kanto	17
Se mi pli juna estus	18
Dum miaj jaroj junaj	19
Progreso	19
Kazimieĵ Tetmajer.	
Pino	20
Himno al amo	20
Ceslav Jankovski.	
Floro	23
Kiomfoje	24
Portreto	24
En balo	25
Aleksander Fredro.	
Paŭlo kaj Gaŭlo	
Kazimieĵ Gliniski.	
Deĉidita malpaco	26
Aŭtoro nekonata. Du polaj kantoj popolaj	27
Jeĵi Julavski.	
El Ekkleziastes	28
ORIGINALAJ VERKOJ de LEO BELMONT.	
Petola luno	31
Horo de morto	32
Vespero	32

II

	Paĝo.
Krio de malespero	33
Mortulo	34
Vortludo	34
Junularo	35
Granda progreso	48

ANGLAJ POETJOJ.

Byron.

Nokt' en la koro	33
----------------------------	----

RUSAJ POETJOJ.

Lermontov.

Preĝo	38
-----------------	----

Minajev

Epigramo	38
--------------------	----

Nekrasov.

Maljuneco	39
---------------------	----

GERMANAJ POETJOJ.

Goethe.

Jam dormas montpintoj	39
---------------------------------	----


Heinrich Heine.

El inermazzo.	
En plej bela monato	39
El miaj larmoj ekkreskas	40
Mi volus meti la animon	40
Senmove staras en altaĵo	40
Vi estas, kiel la flor'	41
Mi portos Vin al Gangeso	41
Karulin', Vi devas diri,	42
Kial paliĝis tiele rozoj	42
Se la floretoj povus koni	43
Mi ploris nokte en dorm'	43
Senĉese min oni turmentis	44
Ili sin amis reciproke	44
Junulo do amas knabinon	44
En profundon de mizero	45
Al brusto, al mia...	45
Azrah	46
Mi ekfermas al ŝi la okulojn	46
Grenadistoj	47

TRADUKOJ de L. BELMONT EL ESPERANTO.

Ludvik Zamenhof.

Moja myśl (Mia penso)	50
Nadzieja esperantystów (En la mondon venis nova sento)	51
Hymn (Himno) wygłoszony na I-ym esperanckim kongresie w Boulogne sur Mer	52



996465 / 1/12

н. 45-

Antylux, DK
Poznań, 1.10.76.
- 45.25.

WYDAWNICTWA M. ARCTA W WARSZAWIE.

<i>Zamenhof L. Dr.</i> Esperanto. Język międzynarodowy. Część I. Gramatyka i ćwiczenia. Wyd. 3-cie	— 25
— Część II. Słownik. Wyd. 3-cie	— 15
— Słownik Esperancko-polski (Fundamenta Vortaro)	— 15
— Fundamenta Krestomatio	1 40
<i>Belmont Leo.</i> Najłatwiejsza metoda języka esperanckiego wierszem	— 15
<i>Grabowski A.</i> Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun Antologio internacia	— 90
— La liro de la Esperantistoj	— 60
— Większy słownik polsko-esperancki	1 40
— Mniejszy słownik polsko-esperancki.	w druku.
<i>Kamiński Zb.</i> Kurs handlowy języka międzynarodowego Esperanto, podług L. Marissiaux.	— 60
<i>Zakrzewski A.</i> Gramatyka języka Esperanto, ze składnią i przykładami	— 80
— Historia i stan obecny języka Esperanto	— 20
— Język międzynarodowy. Historia, krytyka, wnioski	1 20
<i>Kabe.</i> Internacia Krestomatio. Wyjątki z autorów	— 45
— Pola Antologio	— 90
— Unua Legolibro. Gradigitaj Legaĵoj kun frazlibro kaj modeloj de leteroj	— 75

(Specjalne katalogi dzieł i pism w języku Esperanto na żądanie).

LA REVUO

Internacia monata literaturo gazeto

EN ESPERANTO

La sola, kiu estas honorata per la konstanta kunlaborado de

D-ro L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de la lingvo Esperanto

Plej bonstila; zorge revidita, bele presita, akurata eldonata, LA REVUO publikigas novelojn, teatraĵojn, romanajn, poeziojn, seriozajn, studojn pri popolmoroj, historio, geografio, k. c. Ĉiu numero enhavas bibliografian parton, tutmondan kronikon kaj felietonon.


Konkursoj estos organizitaj.

Ĉiu numero havas 48 paĝojn da plej bona teksto!
Ĉiu jaro de LA REVUO komenciĝas la 1-an de Septembro.
Secimenojn estas senpage sendataj.

ONI ABONAS:

ĉe la Librejo ARCT, 53, Nowy-Świat, Warszawa,
unu numero 25 kopekoj, jara abono Rb. 2.80.







884281

Biblioteka Narodowa
Warszawa



30001018126714